Al ĉiuj recenzoj el el Esperanto
sub la Suda Kruco

Al ĉiuj recenzoj

Al ĉefpaĝo Originala literaturo

# De vilaĝo al ĉefurbo

Recenzas Donald Broadribb

*De vilaĝo al ĉefurbo*. de Gbeglo Koffi. Rotterdam: UEA, 1993. 32 paĝoj. Prezo ne indikita.- Aŭtobiografia rakonto pri ia strebo de malriĉa vilaĝa afrikano edukiĝi kaj fariĝi partoprenanto en la "ekstera mondo". En nia luksplena socio ni apenaŭ povas kompreni la ĉiutagan realon en kiu vivas tiom granda parto de la homaro. "La vivo de lernanto, aparte la vivo de afrika lernanto, jes, tio estas problemo. Kiel oni povas sukcesi en la vivo, kiam oni estas ĉiam ĝenata de ĉiaj problemoj: malsato, malsano, perfido, ktp? Mi ege gratulas samkontinentanojn, kiuj malgraŭ tiaj suferoj sukcesas alte studi. La studo gravas por ĉiuj, sed en Afriko la situacio, kiun tieaj anoj travivas, ege malhelpas ilian aitan kleriĝon. Tiu vivo de lernanto koncernas ne nur min sed la tutan Afrikon, ĉar kvankam mi rakontis la propran sperton, tian situacion travivas multaj afrikanoj, kaj iuj suferas eĉ pli akre ol mi. Jes, la vivo de lernanto afrika, aparte togolanda, estas samtempe plaĉa kaj dorna." (p.32.) La libreto celas instigi nin helpi la afrikan popolon, kaj precipe la Fondaĵon Afriko de UEA.

---

Gbeglo Koffi

De vilaĝo al ĉefurbo